

## 2. Konceptoj de interkultura lernado

### 2.1 Enkonduko

Skribi pri konceptoj de interkultura lernado estas interkultura sperto em si mem. Fakte, la diverseco de ideoj, kiuj sin kaŝas malantaŭ la fenomeno de “interkultura lernado” respegulas buntecon de vivhistorioj de ties kreintoj. Eĉ provo elekti iun apartan teorion aŭ fari komentojn pri ĝi, pli indikas al la vivfondo kaj personeco de la provanto ol al la fenomeno de interkultura lernado mem.

Do, tiu ĉi ĉapitro ne celas proponi iuspecan “veron” pri interkultura lernado, sed provas anstataŭe provizi – neeviteble subjektivan – superrigardon de kelkaj malsamaj teorioj kaj konceptoj rilataj al interkultura lernado.

Por ĉiuj teorioj (ankaŭ por tiuj, kiuj estos prezentitaj en tiu ĉi ĉapitro) estas kutime uzi “viziajn” vortojn kaj frazojn. Ni konscie prezentas tiajn teoriojn – certe ne kun la celo fortimigi vin, sed kun la celo konatigi vin kun la koncernaj nocioj. Tiuj teorioj estas bazo por tio, pri kio vi jam dum iom da tempo okupiĝas en praktiko.

La nocio “interkultura lernado” povas esti interpretita je kelkaj niveloj. Laŭ la laŭvorta interpreto interkultura lernado subkomprenas individuan proceson de akiro de konoj, starpunktoj aŭ konduto rilataj al interago de diversaj kulturoj.

Tre ofte tamen la nocio de interkultura lernado estas interpretata pli larĝe kaj priskribas koncepton de socio en kiu homoj kun malsamaj fonoj povas pace kunvivi kaj la proceson bezonatan por krei tian socion.

“Lernado” en tiu interpreto estas malpli individue direktita, sed substrekas la malferman karakteron de la tuta proceso de konstruo de “interkultura socio”.

Sube ni prezentos kelkajn aspektojn kaj interpretojn de “interkultura lernado”.

### 2.1. Kio estas “lernado”?

La vortaro “The Oxford Advanced Learner’s of Current English dictionary” donas jenan difinon de “lernado” (en traduko de la angla): “akiro de konoj aŭ scipovoj pri io per studado, praktiko aŭ instruado”. Tiu tre ĝenerala difino estas elirpunkto de diversaj diskutoj.

### Lernado je diversaj niveloj

Lernado okazas je tri malsamaj, sed interrilataj inter si niveloj: konoj, emocioj kaj modeloj de konduto.

Je *nivelo de lernado de konoj* okazas akiro de scioj, konoj kaj kredoj: ekzemple, ke 3 plus 3 estas 6, ke la tero estas supozata havi formon de globo aŭ ke Konsilio de Eŭropo havas momente 41 membroŝtatojn.

Koncepto de *emocia lernado* estas pli malfacila por kompreni. Por ekhavi imagon pri tiu speco de lernado, provu rememori kiel vi ellernis esprimi viajn sentojn kaj kiel tiuj sentoj ŝanĝighis intertempe. Tio, kio timigis vin 20 jarojn antaŭe eble ne plu estas timiga, homoj, kiujn vi iam ne ŝatis, povas nun esti viaj plej bonaj amikoj ktp.

Lernado en *nivelo de modeloj de konduto* estas la plej videbla parto de la tuta proceso. Al ĝi ekzemple apartenas kapabloj enbati per martelo najlon en lignopecon, skribi per skribilo, manĝi per bastonetoj aŭ en ĝusta maniero bonvenigi gaston.

Vera lernado enhavas ĉiujn tri nivelojn. Se vi volas ellerni manĝi per bastonetoj, vi bezonos scii, kiel vi estas supozata teni ilin kaj lerni la ĝustajn movojn. Sed neniu konoj kaj scioj havos longdaŭran efikon sur vin, se vi ne persone ŝatas manĝi per ili – aŭ almenaŭ ne se vi iumaniere profitas de tio.

#### *Lernado kiel (ne)planita proceso*

Lernado povas okazi kiel hazarde tiel ankaŭ rezulte de planita proceso. Se ni provos rememori nian pasintecon, ni komprenos, ke multon ni lernis en la procesoj al kiuj ni aliĝis ne pro intenco ion lerni de ili. De alia flanko, lernado plejparte okazas kiel iuspeca konscia, aŭ almenaŭ intenca proceso. Ni nenion povas lerni de neplanita sperto, se ni ne intence analizos ĝin. Ambaŭ la neformala kaj formala eduksistemoj uzas planitajn procesojn por faciligi lernadon. Ekde la momento kiam vi eklegis tiun ĉi T-kiton por pripensi pri interkultura lernado en grupkondiĉoj, vi plej verŝajne estas envolvita en lernadon kiel en planitan, sed ne pure hazardan proceson. Spertoj pri interkultura lernado pere de trejnkursoj, seminarioj, grupaj renkontiĝoj, interŝanĝoj ktp, estas ekzemplo de planitaj procesoj de interkultura lernado.

#### *Roloj en lernado*

Lernado koncernas ankaŭ specifajn rolojn. Por plejparto de infanoj la unua sperto de planita lernado estas lernejo, kaj sekve unu el plej evidentaj disdividoj de roloj estas “instruisto - lernanto”. Por homoj, kiuj estas envolvitaj en sistemon de neformala edukado, estas memkomprenebla, ke lernado povas efike funkcii en ambaŭ direktoj, ĉar homoj interagante lernas unu de la alia. Fakte, ni estas en konstanta proceso de lernado, eĉ se multaj homoj ne konsideras sin mem lernantoj kaj foje senkonscie preferas la rolon de instruisto. Malfermiĝo al reciproka lernado estas unu el defioj, kiun ĉiuj envolvitaj en neformalan edukadon spertas komence de laboro kun nova grupo. Persone mi dezirus, ke ankaŭ homoj envolvitaj en sistemon de formala edukado kuraĝus alfronti tiun defion en la klasĉambro.

#### *Metodoj de lernado*

Se ni rigardas al lernado kiel al planita proceso, estus logike paroli ankaŭ pri metodoj uzataj en tiu proceso. Esploristoj jam plurfoje pruvis, ke plej multon oni lernas de sia propra sperto – en situacioj, kiuj envolvigas percepton, emociojn kaj agadon. Se ni volas, ke okazu lernado, ni devas provizi taŭgajn metodojn, kiuj permesos akiron de sperto kaj eblecon por analizo je ĉiuj tri niveloj.

Proponojn pri metodoj kaj metodologioj de interkultura lernado vi povos trovi pli poste en la artikolo.

### 2.3. Kio estas kulturo?

Kaj sekve – kio estas interkultura? La dua nocio en “interkultura lernado” estas kulturo. Ĉiuj ideoj pri interkultura lernado estas konstruitaj sur eksplicita aŭ implicita ideo de kulturo. Ĉiuj el ili rigardas al kulturo, kiel produkto de homo. Kulturo estas komparata al iusenca “programaro”, kiun homoj uzas en ĉiutaga vivo. Oni kutime priskribas, ke ĝi temas pri bazaj hipotezoj, valoroj kaj normoj posedataj de individuoj. Ĉirkaŭ konceptoj de kulturo estas multe da diskutoj, kiel en teorio, tiel ankaŭ en praktiko:

- Ĉu kulturo ĉiam estas ligata al grupo de homoj, aŭ ĉu ekzistas ankaŭ “individua” kulturo?
- Kio estas la aspektoj de kulturo?
- Ĉu eblas fari “kulturan mapon” de la mondoo?
- Ĉu kulturoj ŝanĝiĝas? Se jes – kial kaj kiam?
- Kiom forta estas la ligo inter kulturo kaj praktika konduto de individuoj kaj grupoj?
- Ĉu oni povas havi pli ol unu kulturan fonon – kaj kion tio signifas?
- Kiom fleksebla estas kulturo, kiom malferma estas ĝi por persona interpreto?

Tre ofte per “observi kulturon” oni subkomprenas fakte observi interagon de kulturoj. Multaj aŭtoroj jam venis al konkludo, ke se ne ekzistus pli ol unu kulturo, neniam aperus mem la nocio. Videblaj diferencoj de tio, kiel homoj povas pensi, senti kaj agi – jen kio konsciigas nin pri kulturo. Sekve, kulturo ne estas simple “kulturo”, ĝi estas “kulturoj”. Sekve, en tiu ĉi ĉapitro estus logike koncentriĝi ne pri kultur-centritaj teorioj, sed pri teorioj, kies esplorobjekto estas interago de kulturoj kaj interkulturaj spertoj.

De tempo al tempo anstataŭ “interkultura” estas uzataj terminoj “multkultura” aŭ “transkultura”. Por kelkaj aŭtoroj tiuj terminoj estas identaj, kelkaj aliaj donas al ĉiu el ili specifan kaj malsaman signifon. Tiujn malsimilaĵojn ni pli detale preparolos pli poste.

### 2.4 Teorioj kaj modeloj de kulturo

#### 2.4.1 La glacimonta modelo de kulturo

Unu el la plej konataj modeloj de kulturo estas la t.n “glacimonto”. Ĝi fokusiĝas pri eroj, el kiuj konsistas kulturo kaj pri la fakto, ke kelkaj el tiuj eroj estas tre videblaj, dum estas malfacile malkovri aliajn.

Bildo. 1: Glacimonta koncepto de kulturo

Konsciata, videbla parto : Artoj, Literaturo, Dramo, Klasika muziko, Populara muziko, Popoldancoj, Ludoj, Kuirarto, Vestaĵoj.

Nekonsciata, nevidebla parto: Imagoj pri modesteco, Koncepto de beleco, Idealoj de edukado de infanoj, Reguloj de deca konduto, Kosmologio, Rilatoj al bestoj, Modeloj

de rilatoj inter superuloj kaj subuloj, Difino de peko, Reguloj de afableco, Koncepto de justeco, Stimuloj labori, Nocioj de gvidanteco, Ritmo de laboro, Preno de decido en grupoj, Koncepto de pureco, Rilato al dependaj personoj, Teorio de malsano, Aliro al solvado de problemoj, Koncepto de evoluo, Okulkontaktoj, Disdivido de roloj depende de aĝo, sekso, socia pozicio, okupo, aparteno al certa parenkaro ktp., Difino de frenezeco, Amikeco, Koncepto de personeco, Modeloj de vida percepto, Korpa lingvo, Vizaĝesprimoj, Nocioj de logiko kaj valideco, Emociaj modeloj, Konversaciaj modeloj en diversaj sociaj ĉirkaŭaĵoj, Koncepto de pasinteco kaj estonto, Disdivido de tempo, Elekto de konkurenco aŭ kunlaboro, Socia interagado, Nocio de juneco, Aranĝo de spaco ktp.

Fonto: p. 14 AFS Orientation Handbook Vol. 4, New York: AFS Intercultural Programs Inc., 1984

La ĉefa ideo de tiu modelo estas prezenti kulturon kiel glacimonton: nur tre eta parto de la tuta glacimonto videblas super la akvo. Tiu supra parto de la glacimonto havas sub si multe pli grandan parton, kiu troviĝas sub akvo kaj sekve ne estas videbla. Sed ĝuste la subakva parto estas la vera bazo de la tuta kulturo.

Kulturo, do, enhavas kelkajn videblajn erojn kiel ekzemple arkitekturo, arto, kuirarto, muziko, lingvo, sed oni malfacile malkovras erojn de la vera bazo: historion de certa kultura grupo, ĝiajn normojn, bazajn imagojn pri spaco, naturo, tempo ktp.

Laŭ la glacimonta modelo videblaj eroj de kulturo estas nur manifesto de la nevideblaj partoj. Krome tiu modelo montras, kiom malfacilas foje kompreni personojn kun malsamaj kulturaj fonoj – ni povas vidi la suprajn partojn de ilia “glacimonto”, sed ne vidas, sur kiu bazo ili sin apogas. De alia flanko, la glacimonta modelo ne povas doni respondon al ĉiuj demandoj rilate kulturon. Plej ofte ĝi estas uzata kiel ilustrado de malfacilaĵoj “vidi” kaj kompreni kulturon kaj ankaŭ kiel iusenca starpunkto por plia enprofundiĝo en la demandon.

### ***Apliko en junulara laboro***

La glacimonta modelo fokusas nian atenton sur la kaŝitaj aspektoj de kulturo. Ĝi memorigas, ke dum kontaktoj inter diversaj kulturoj, similaĵoj kiujn ni povas trovi havas sub si tute malsamajn bazojn kaj imagojn pri realeco. Inter junuloj kulturaj diferencoj ne ĉiam estas tre klare videblaj: tra la tuta mondo junuloj ŝatas ĝinzojn, pop-muzikon kaj ne povas vivi sen retroŝto. Celo de interkultura lernado estas tiukaze konsciiĝi pri la subakva parto de nia glacimonto kaj povi preparoli ĝin kun aliaj por pli bone interkompreniĝi kaj trovi komunajn erojn en niaj bazoj.

### ***2.4.2 Modelo de kulturaj aspektoj de Geert Hofstede***

La teorio de kulturo de Geert Hofstede baziĝas sur unu el la plej ampleksaj empiriaj pristudoj de kulturaj diferencoj en la historio de homaro. En 70-aj jaroj IBM (jam tiam granda internacia firmao) konsultis lin pri la fakto, ke malgraŭ la streboj de IBM establi komunajn standartojn de laborprocesoj en la tuta mondo, daŭre restis tre grandaj diferencoj en administrado de fabrikoj en diversaj landoj (ekz. Japanio kaj

Brazilio). Hofstede esploris tiujn diferencojn en administrado de IBM-fabrikoj. Pere de detalaj intervjuoj kaj demandaroj dissenditaj al ĉiuj IBM-dungitoj en la mondo, li provis eltrovi la diferencojn kiuj ekzistis en diversaj fabrikoj. Surbaze de tio, ke IBM-dungitoj ĉie havis pli-malpli saman edukon kaj ke ankaŭ la strukturo de organizo, ekzistantaj reguloj kaj proceduroj estis ĉie la samaj, li konkludis, ke la ekzistantaj diferencoj devas baziĝi sur la kulturo de dungitoj de ĉiu aparta fabriko, kaj sekve grandparte de la kulturo de la koncerna lando. Hofstede priskribas kulturon kiel "kolektivian intelekt-programadon kiu distingas membrojn de unu grupo de membroj de la alia".

Post iom da tempo li reduktis ĉiujn kulturajn diferencojn al 4 bazaj aspektoj, de unu aŭ kelkaj el kiuj originas ĉiuj ceteraj kulturaj diferencoj. La 4 ĉefaj aspektoj laŭ Hofstede estis: disdivido de potenco, individualismo/kolektivismo, vireco/ineco kaj evitado de malcerteco. Post iom da aldonaj esploroj, li aldonis al la listo aspekton de tempa orientiĝo.

***Disdivido de potenco*** indikas la gradon ĝi kiu la socio akceptas la fakton, ke la potenco inter individuoj en institucioj kaj organizoj ne estas disdividita egale. Disdivido de potenco temas pri hierarkio, pri, ekzemple, maniero preni decidojn en junulara organizo. Ĉu ĉiuj rajtas egalgrade sin esprimi? Aŭ ĉu la gvidanto en certaj kondiĉoj rajtas preni memstarajn decidojn?

***Evitado de malcerteco*** montras en kiu grado socio sentas sin minacata de malklaraj kaj dubindaj situacioj kaj provas eviti ilin fiksante certajn regulojn aŭ aliajn sekurecilojn. Evitado de malcerteco montriĝas ekz. en tio kiom riskemaj estas homoj, aŭ en tio kiom detale membroj de organiza teamo ŝatus diskuti la planon de la trejnkurso. Kiom da spaco ricevas hazardeco, improvizado aŭ neplanitaj okazaĵoj, kiuj senkontrole evoluas en sia propra (eble malĝusta) maniero?

***Individualismo/Kolektivismo*** montras kiom loza aŭ strikta estas la socia kadro. En la unua kazo individuoj estas supozataj zorgi nur pri si mem aŭ pri siaj familioj, dum en la dua ekzistas klara disdivido en membrojn kaj ne-membrojn de certa grupo, kaj "membroj" estas supozataj zorgi pri siaj samgrupanoj. Ekzemple, en kolektivistaj kulturoj homoj sentas tre fortan apartenon al kaj respondecon pri sia familio, kaj preferas senti sin membro de certa grupo.

***Vireco/Ineco*** montras kiom forte estas determinitaj sociaj roloj de viroj kaj inoj. Ĉu, ekzemple, inter viraj kaj inaj partoprenantoj de la seminario ekzistas "natura" disdivido de taskoj, aŭ ĉu mastrumaj taskoj estas plenumataj de viroj same ofte kiel de virinoj?

***Tempa orientiĝo*** montras la gradon en kiu decidoj prenitaj de socio baziĝas sur tradicioj kaj sperto de pasinteco, aŭ, en mallonga perspektivo, sur nuntempaj profitoj aŭ potencialaj profitoj en estonto. Kiom grava, ekzemple, laŭ vi, estas la historio de via regiono por ĝia nuntempo kaj la estonto? Kiam homoj fanfaronas pri sia origino, ĉu ili parolas pri la pasinteco, nuntempo aŭ estonto?

Hofstede ellaboris kelkajn tabelojn por klasifiki diversajn sociojn (naciojn) depende de la grado en kiu ĉiu unuopa aspekto estas esprimita en la koncerna grupo. Tiu grado estis kalkulita pere de analizo de respondoj al demandoj kaj plurfojaj esploroj surbaze de tiu ĉi modelo. (rig. Fig 2)

La modelo de Hofstede estas aprezata pro la forta empiria bazo. Apenaŭ iu alia pri-kultura teorio aŭ esploro povas oferti kompareblan kvanton de praktike ricevitaĵ datumoj. De alia flanko tiu ĉi teorio ne klarigas, kial devas esti nur 5 kulturasppektoj kaj kial ĝuste ili estas la bazaj eroj de kulturo. Des pli, - tiu ĉi modelo subkomprenas kulturon pli kiel statikan, ol kiel dinamikan proceson. Tiu ĉi teorio ne klarigas kial kaj kiumaniere okazas evoluo de kulturoj. Tiu teorio tro fokusas sur kulturo, kiel nacia karakterizo kaj neglektas fenomenojn de kultura diverseco (tipa por plej multaj modernaj socioj), sub-kulturoj, miksitaĵ kulturoj kaj individua evoluo. Danĝero de tiuspeca priskribo de kulturo estas risko taksi kelkajn kulturojn “pli bonajn” ol la aliaj. Tamen, por plej multaj legantoj, la modelo de 5 aspektoj sentiĝas tre kongrua kun la reala strukturo de socioj.

### ***Apliko en junulara laboro***

Oni povas ne konsenti kun Hofstede pri tio, ke nur tiuj 5 aspektoj formas bazon de kulturo. Tamen ĝuste ili tre ofte montriĝas la esencaj eroj de kulturaj diferencoj kaj pro tio tre utilas por kompreni konfliktojn inter individuoj aŭ grupoj kun malsamajkulturaj fonoj. Partoprenantoj ekas kompari diversajn naciajn kulturojn surbaze de la tabelo de Hofstede: ĉu mi venas de pli hierarkia sistemo? Ĉu vere por mi sekureco pli gravas ol por la aliaj? Sekve, de unu flanko la aspektoj de Hofstede provizas taŭgan kadron por interpreti kulturajn miskomprenojn kaj donas startpunkton por analizo de diferencoj inter partoprenantoj. (ekz.: Kio estas via ideo pri potenco kaj gvidanteco?). De alia flanko ili igas nin analizi nin mem kaj esplori, ĉu eblas ĝenerale apliki tiujn aspektojn al ĉiu unuopa individuo de la koncerna lando. Krome, tiuj aspektoj estas uzablaj kiel referenca kadro por analizi diversajn vivĉirkaŭaĵojn (studentan “kulturon”, “kulturon” de nia familio kaj amikoj, “kulturon” de kamparaj kaj urbaj regionoj ktp). Indas starigi la demanon – ĝis kiu grado tia analizo helpas al ni iĝi pli sagacaj kaj ĝis kiu grado ĝi simple kontribuas al apero de pliaj stereotipoj. Finfine, la 5 kulturasppektoj kaj individuaj preferoj pri ili, starigas la demandon pri kultura relativeco: ĉu vere ne estas “pli” kaj “malpli bonaj” kulturoj? Ĉu hierarkiaj strukturoj estas same bonaj kiel pli demokratiaj? Ĉu strikte difinitaj roloj de viroj kaj inoj estas same bonaj, kiel pli “malfermaj”? Kaj finfine, kaze ke ni volas esti peranto en la kultura konflikto kaj elektas tiujn aspektojn kiel referenckadron, ĉu ni devas, kaj ĉu ni povas resti neŭtralaj?

•Fig.2 Pozicio de 50 landoj kaj 3 regionoj laŭ la aspektoj de disdivido de potenco kaj evitado de malferteco.

Fonto: p.141, Hofstede, Geert (1991) *Cultures and organisations: software of the mind*, London: McGraw- Hill. Copyright © Geert Hofstede, reproduced with permission.

Egala disdivido de potenco  
Forta evitado de malcerteco  
(bone oleumita aparato)

Egala disdivido de potenco  
Malforta grado de evitado de malcerteco  
(vilaĝa merkato)

Grado de evitado de malcerteco

Malegala disdivido de potenco  
Forta evitado de malcerteco  
(piramida strukturo)

Disdivido de potenco  
Malegala disdivido de potenco  
Malforta grado de evitado de malcerteco  
(familio)

•

#### ***2.4.3. Kulturaj modeloj de konduto de Edward T. kaj Mildred Reed Hall.***

Tiu duopo ellaboris la modelon de kulturo pro praktika bezono. Ili volis doni utilajn konsilojn al usonaj negocistoj kiuj afervojaĝis eksterlanden. Kadre de ilia esploro estis detale intervjuitaj reprezentantoj de diversaj kulturoj, kun kiuj usonaj negocistoj planis kunlabori. En la centro de la esploro estis tiuj (apenaŭ rimarkeblaj) diferencoj en kondukmodeloj, kiuj ofte kaŭzis konfliktojn en interkultura komunikado.

Rezulte de esploroj ili eligis kelkajn tipojn de diferencoj rilate al modelo de komunikado, al koncepto de spaco aŭ al koncepto de tempo.

***Rapidaj kaj malrapidaj signaloj*** rilatas al “rapideco kun kiu estas dekodita aparta signalo kaj depende de tio ŝanĝita konduto”. Ekzemploj de rapidaj signaloj estas ĵurnaltitoloj, anoncoj kaj televido. Homoj, kiuj rapide transiras al neformala stilo de komunikado estas pli sentemaj al rapidaj signaloj. Ĝenerale profunda interkonatiĝo postulas tempon (tio apartenas al la kategorio de “malrapidaj signaloj”), sed tamen en kelkaj kulturoj amikiĝo okazas pli rapide ol en aliaj, kio pruvas ke facila familiariĝo estas unu el ekzemploj de rapidaj signaloj.

Al malrapidaj signaloj apartenas arto, dokumenta kino, profundaj rilatoj ktp.

***Konvencia kaj senkonvencia kunteksto*** de komunikado priskribas la specon de informfluo. Se la mesaĝo transdonita en certa momento liveras nur tre etan kvanton de informo, dum plej granda parto de informo jam estas posedata de komunikantoj, oni parolas pri konvencia kunteksto de komunikado. Tiuspeca estas komunikado inter geedzoj, kiuj loĝis kune jam dum kelkaj jaroj: por kompreni unu la alian ili devas interŝanĝi nur etan kvanton da informo. Mem la signalo povas esti tre mallonga, sed por dekodi ĝin oni uzas la dum jaroj akumulitan aron de konoj unu pri la alia. La tipaj kulturoj de konvencia kunteksto de komunikado estas laŭ Hall & Hall japana, araba

kaj kulturoj de Mediteraneo. Ilin karakterizas vasta interpersona informreto kaj multaj intimaj personaj rilatoj. Sekve, en la ĉiutaga vivo oni nek bezonas, nek atendas multe da socifona informo. Gravas antaŭ ĉio informiĝo pri ĉio rilata al proksimaj kaj konataj homoj.

Tipaj kulturoj kun senkonvencia kunteksto de komunikado estas usona, germana, svisa kaj skandinava. Personaj rilatoj estas venas de konkretaj okupoj de ĉiu persono. Kaj kutime en interŝanĝo de novaĵoj bezonatas pli da fona informo.

Ne sufiĉa atento al diversaj stiloj de komunikado depende de konvencia kaj senkonvencia kunteksto, povas rezultiĝi en miskomprenoj. Tiel al persono de konvencia kunteksto povas ŝajni, ke komunikanto venanta de medio de senkonvencia kunteksto, tro multe parolas, tro precizigas, tro profundiĝas en necesajn detalojn. Inverse povas okazi, ke al persono al kutimiĝinta al senkonvencia kunteksto la komunikanto de alispeca medio ŝajnos nefidinda (ja li “kaŝas” informon) kaj neema kunlabori.

Por preni decidon, personoj, kiuj kutimas al senkonvencia kunteksto, unue volas ricevi sufiĉan kvanton de fona informo, dum reprezentantoj de medio kun konvencia komunikokunteksto ne bezonos multe da fona informo, ĉar ili jam dekomence “konas” ĉiujn detalojn de evoluo de projekto. La paradoksa situacio aperas kiam oni petas al personoj el medio kun konvencia kunteksto pritaksi alies projekton. Tiam ili subite volas ricevi ĉiujn eblajn detalojn, ĉar ili ne konas la “ĉirkaŭ-projektan” medion.

*Aranĝo de spaco* rilatas al organizado de spaco en, ekzemple, oficejo. Ĉu la oficejo de prezidanto estas en plej supra etaĝo de konstruaĵo, aŭ ĉu en iu el mezaj etaĝoj? Se, ekzemple, oni opinias skribilojn sur tablo parto de persona teritorio, tiam oni apenaŭ aprezos tiujn, kiuj prunteprenas ilin sen permeso de la posedanto. Koncepto de teritorio temas ankaŭ pri rilato al spaco kaj materiaj aĵoj en tiu spaco, ĉar ankau tio povas esti unu el indikiloj de potenco.

*Persona spaco* estas distanco je kiu devas troviĝi aliaj homoj por ke koncerna individuo sentu sin komforte. Hall & Hall priskribas personan spacon kiel “vezikon” kiun ĉiu individuo portas sur si la tutan tempon. Ĝi povas ŝanĝi grandecon depende de situacio kaj homoj, kun kiuj oni interagis (tiel proksimajn amikojn oni lasas proksimiĝi pli ol nekonatajn homojn). “Veziko” montras kiun distancon ĝis aliaj homoj oni opinias konvena. Tiun, kiu staras pli for ol je konvena distanco, oni perceptos tro distanca kaj neinteresiĝanta. Provon proksimiĝi pli, ol permesas konvena distanco, oni verŝajne interpretos kiel ofendon, provon timigi aŭ signon de malbona eduko. La sama distanco povas esti standarta por konversacioj en unu kulturo kaj intima por alia. Malsamaj interpretoj povas kaŭzi konfliktojn en komunikado.

*Unu-samtempa aŭ plur-samtempa tempoorganizado* rilatas al maniero aranĝi tempon. En unu-samtempa sistemo oni faras unu aferon post la alia, oni sekvas la temposkemon kie unu afero sekvas post la alia, t.e. diversaj taskoj estas farataj sinsekve, en speciale por ili rezervita tempo. Tempo por kulturoj kun unu-samtempa

sistemo estas unu el praktikaj aspektoj de vivo, ĝi estas preskaŭ tuŝebla. Oni parolas pri ĝi kiel pri fizika resurso, kiun eblas elspezi, perdi aŭ savi. Tempo estas la linio, kiu etendas sin de pasinteco tra la nuntemo al estonto. Tempo estas la ilo por strukturigi tagon kaj por decidi pri momentaj prioritatoj (ekz. oni povas “ne havi tempon por renkonti iun”).

Plur-samtempa tempoorganizado funkcias alimaniere. Pluraj aferoj estas farataj samtempe. Tia strukturo estas multe pli orientita al rilatoj en ies ĉirkaŭaĵo. Rilatoj kun aliaj estas pli gravaj ol strikta plenumo de la temposkemo. En tiu strukturo tempo ne estas konsiderata resurso, kaj sekve pli similas al punkto, ol al linio.

Hall & Hall opinias, ke kelkaj el supre menciitaj aspektoj estas interligitaj. Tiel la unu-samtempa organizado de tempo estas laŭ ili firme ligata al senkonvencia komunikada kunteksto kaj al spac-aranĝo kiu permesas frakciigon de vivo (en strukturon kie malsamaj partoj de la vivo estas apartigitaj unu de la alia kaj metitaj en apartajn “ĉelojn”). Aldone al jam menciitaj aspektoj, Hall & Hall prezentas kelkajn aliajn konceptojn, kiuj postulas specialan atenton, ekz. kiel funkcias la tempoplanado en certa kulturo, kiom anticipe oni devas aranĝi renkontiĝojn, kio estas konsiderata “deca” el vidpunkto de akurateco, kaj kiun specon de informfluo oni uzas en la sistemo: ĉu informo iras nur en direktojn supren-malsupren (en hierarkia sistemo), aŭ ĉu ĝi disvastiĝas en ĉiujn direktojn en la vasta reto? En aferecaj kontaktoj kun reprezentantoj de aliaj kulturoj Hall & Hall konsilas al sia celgrupo, t.e. usonaj negociantoj, konscii pri kulturaj diferencoj kaj laŭeble adapti sian konduton al lokaj kutimoj. Teorio de Hall & Hall prezentas plej videblajn kaj signifajn diferencojn, kiujn homoj spertas dum interkultura komunikado kaj kiuj estas pro tio tre facile rekoneblaj por multaj legantoj. Tamen nek tiu teorio estas plene senriproĉa. Hall & Hall komence priskribas kelkajn aspektojn, sed nur unu el ili metas en la centron de la modelo: ĉiuj kulturoj formas la vicon je unu fino de kiu estas kulturoj kun unu-samtempa organizado kaj malforta kunteksto de komunikado kaj je la alia – plur-samtempaj kulturoj kun forta komunikada kunteksto. Ĉiuj aliaj aspektoj kaj kategorioj baziĝas sur tiu disdivido. La demando estas, ĉu tiu simpligita klasifikado respegulas la realan staton de aferoj?

Aldona al ĉio tiu teorio nek mencias originon de kulturaspektoj, nek starigas la demandon pri evoluo de kulturoj (ĉu kulturoj estas statikaj aŭ dinamikaj?), nek analizas kiel kultura fono influas individuojn en la proceso de interkultura komunikado.

La teorio de Hall & Hall estas antaŭ ĉio aplikebla en praktiko. Aspektoj (tre similaj al tiuj en modelo de Hofstede) provizas la kadron por rekoni kaj interpreti kulturajn diferencojn.

### ***Apliko en junulara laboro***

En interkulturaj grupoj oni povas uzi modelon de Hall & Hall kiel enkondukan “teorian” aliron al kulturaj diferencoj. Surbaze de ĝi eblas ellabori efikajn ekzercojn, ekz. peti al partoprenantoj dum konversacio ŝanĝi la distancon inter ili. Ĉu ili ambaŭ

havas saman imagon pri kio estas la konvena distanco? Kiumaniere oni kondukos sin, se interparolanto tro proksimiĝas aŭ inverse, staras tro malproksime?

Teorion de Hall & Hall kutime estas facile ligi al diferencoj, kiujn spertas membroj de interkultura grupo. Ili estas bona starpunkto por preparoli tiujn diferencojn sen ke taksi iun el ili "bona" aŭ "malbona". Utilo de tiu modelo por trejnistoj estas en tio, ke ĝi 1) helpas rekoni interkulturajn diferencojn en la grupo (ekz. kiom punktualaj estas diversaj partoprenantoj, ĉu ili ŝatas esti tuŝataj aŭ ne, ĉu ili opinias, ke oni parolas tro aŭ maltro) kaj 2) provizas "vortaron" por priskribi tiujn diferencojn. Oni tamen estu pretaj al tio, ke post konatiĝo kun tiu modelo, partoprenantoj uzos ĝin por senkulpiĝi sin pri io ajn: "Pardonu, mi ne malfruis je unu horo – mi simple estas de plur-samtempa socio!"

#### ***2.4.4 Kulturanalizo de Jacque Demorgon kaj Markus Molz***

Jacque Demorgon kaj Markus Molz (1996) ne celis krei ankoraŭ unu modelon de kulturo. Laŭ ili naturo de kulturo gvidas al tio, ke ajna provo difini kulturon estos neobjektiva kaj forte influata de kultura fono de difinanto: ni ne povas ne aparteni al certa kulturo. Ilia celo estis kontribui al analizo de diskuto pri kulturo:

Laŭ Demorgon kaj Molz kelkaj aparte disputeblaj partoj de la diskuto pri kulturo rezultiĝas en tri ĉefaj demandoj:

- Kiel eblas kunigi kulturan stabilecon kaj longdaŭrajn kulturajn strukturojn de unu flanko kaj procesojn de kulturaj ŝanĝoj kaj renovigo de alia flanko?
- Kiumaniere interrilatas "kulturo" kaj "interkulturo": ĉu kulturo estas pli aĝa fenomeno, surbaze de kiu iĝis eblaj interkulturaj spertoj? Aŭ ĉu kulturo povas aperi ekskluzive en interagoj inter diversaj kulturoj?
- Ĉu oni devas unuavice substreki aspektojn, kiuj estas komunaj por ĉiuj homoj, kaj konsideri kulturon individua trajto, kiu estas samtempe kaj unika kaj universala (universala aliro)? Aŭ ĉu oni devas substreki la rolon de kulturo kaj agnoski la diversecon ekzistantan en la mondo kaj konsideri individuojn membroj de aparta kultura grupo kaj ĉiujn kulturojn konsideri egale bonaj (relativista aliro)?

Supre menciitaj demandoj povas ŝajni tro teoriaj kaj neuzebaj en praktiko. Sed tamen ili havas kelkajn politikiajn konsekvencojn: ĉu oni konsideru ŝanĝojn minaco aŭ ne (demando 1)? Ĉu diverseco en certa lando estas premiso por apero de kulturo aŭ minaco al "origina" kulturo (demando 2)? Ĉu loĝantoj de iu certa lando estas individuoj, kiuj estu traktitaj sur egala bazo (la franca modelo de individuaj rajtoj) aŭ ĉu ili povas havi rajtojn nur kiel membroj de certa grupo al kiu ili apartenas (nederlanda modelo de socio kiu konsistas el diversaj grupoj ĉiu el kiuj posedas proprajn instituciojn) (demando 3)?

Provante srespondi al tiuj demandoj Demorgon kaj Molz prezentas tion, kion mi persone konsiderus modelon de kulturo. Laŭ ili kompreni kulturon eblas nur se oni ligas ĝin al la koncepto de adaptado. Ĉiuj homoj alfrontas defion establi longdaŭran konekton inter interna (bezonoj, ideoj ktp.) kaj ekstera (medio, aliaj homoj ktp.) mondo. Establo de tiu konekto en konkreta viva situacio donas bazon por posta analizado. En ajna situacio individuoj samtempe kaj "kreas" siajn ĉirkaŭaĵojn (ĉiu

unuopa homo povas influi okazaĵojn ĉirkaŭ si), kaj mem estas “kreata” de situacio (okazaĵoj influas kaj ŝanĝas homojn). “Kreanta” kaj “kreato” estas en tiu ĉi kazo du flankoj de “adaptado”. Uzante pli sciencajn terminojn, Demorgon kaj Molz nomas unu el tiuj procesoj “asimilado”. Per tio ili subkomprenas proceson dum kiu oni adaptas la eksteran mondon al propra persona realeco. Signaloj venantaj de ekstere estas metitaj en “ĉelojn” kaj strukturojn jam ekzistantajn en la cerbo. Unu el plej elstaraj ekzemploj de asimilado estas ludantaj infanoj: ajnan amason de sablo ili povas imagi Everesto (interna imagpovo). Dum ili grimpas sur tiun sablomonton, okazas asimilado de realeco al ilia persona imagkapablo kaj tio provizas kadron por ilia agado. Ili grimpas ne sur sablamason, sed sur Evereston. Asimilado estas tipa ne nur por infanoj: vidante la unuan fojon novan personon, ni ricevas imagon pri lia/ŝia aspekto. Surbaze de tiu limigita informo kaj uzante informojn (ĉefe stereotipojn), kiuj jam ekzistas en nia cerbo, ni konkludas kia li aŭ ŝi estas kaj decidis pri maniero rilati al tiu persono.

La duan proceson Demorgon kaj Molz nomas “akomodado”. Per tio ili subkomprenas proceson en kiu cerbo-strukturoj (“distingiloj” kaj “skemoj”) ŝanĝiĝas sub influo de ekstere venanta informo. Renkontante iun, ni komence interpretas lian/ŝian konduton surbaze de stereotipoj posedataj de ni. Sed pli poste ni povas lerni, ke realeco aspektas aliel, ke niaj stereotipoj kaj skemoj ne kongruas kun ĝi kaj sekve devas esti ŝanĝitaj. Nek ekstrema akomodado, nek ekstrema asimilado estas eblaj. Kaze de ekstrema akomodado, ni dronus en troa kvanto de de-ekstere venanta informo kiun ni devus akcepti, analizi en la “freŝa” maniero kaj uzi por krei novan pensmanieron. Kaze de ekstrema asimilado, ni neus realecon kaj rapide pereus.

Kompare al bestoj, homoj estas genetike malpli “pret-konstruitaj” - ni havas malpli da “enprogramitaj” biologiaj strukturoj. Rezulte, en multaj situacioj ni ne jam havas instinktan, biologie enprogramitan reagon. Por povi orientiĝi ni devas ellabori propran sistemon, kiu ebligas al ni adaptiĝi al diversaj situacioj. Ĝuste tiun sistemon Demorgon kaj Molz nomas “kulturo”. Adaptado tiukaze provizas (kaj pligrandigas) la kapablon konvene reagi al laŭeble plej multaj situacioj, dum kulturo ebligas orientiĝi en tiaj situacioj. Alivorte, sub “kulturo” oni devas kompreni cerbostrukturojn, surbaze de kiuj okazas procesoj de adaptado kaj asimilado. “Kulturo” estas daŭrigo de biologia naturo. Ĝi ekzistas pro la bezono orientiĝi en situacioj en kiuj homoj ne jam posedas biologie enprogramitan reagon.

Adaptado kiel serĉado de orientiĝo okazas en konstanta konflikto inter asimilado kaj akomodado. De unu flanko ni ne povas la tutan tempon “komenci de nulo” kaj pro tio bezonas ellabori stabilajn strukturojn, kondutmodelojn, kiujn eblas ĝeneraligi kaj poste uzi en ajnaj situacioj. En tiu senco dum asimilado kulturo estas uzata (laŭ difino de Hofstede) kiel intelekta programaro. Ĝi ebligas prilaborii informon venantan de la ekstera mondo.

De alia flanko Demorgon kaj Molz substrekas, ke se kulturo estus nur “programaro”, kiu estas metita en homoj dum ilia juneco, ni ne kapablus adaptiĝi al novaj kondiĉoj kaj ŝanĝi nian konduton kongrue al ili. Por travivi oni bezonas kapablon akomodati, ŝanĝi personan orientiĝon kaj referenckadrojn.

Sekve, nia konduto en ĉiu aparta situacio estas iusenca mikso de kulturorientita, ellernita, praktike uzita sortimento de agoj kaj reagoj kaj de detala alkonformiĝo al konkreta situacio. Analizante tian situacion deekstere, ni konkludas, ke ni povas

elekti kondutojn el la vasta spektro de eblecoj inter du kontrastaj alternativoj: ekz. de unu flanko ni povas rapide reagi sen ke unue ricevi sufiĉe da informo, de alia flanko inverse - unue ricevi informon, sed tiukaze reagi malpli rapide. En ajna situacio ni povas koncentriĝi nur sur unu de ĝiaj aspektoj aŭ direkti nian atenton al ĉio kio okazas ĉirkaŭe. Ni povas komuniki eksplicite (uzante detalajn klarigojn) aŭ implicite (uzante simbolojn). Ĉiu aparta situacio proponas al ni centojn da kontrastaj alternativoj kaj ni devas konstante elekti inter tiuj. (rig. Fig. 3)

Fig. 3: Oscilado de kontrastaj alternativoj en proceso de adaptado

Fonto: p.54, Thomas, Alexander (ed) (1996) *Psychologie interkulturellen Handelns*, Gottingen: Hogrefe.

Fig. 4:

Oni povas ankaŭ desegni tiujn kontrastajn elektojn kiel du ekstremajn punktojn sur linio (fig. 4). La tuta linio reprezentas la aron de eblaj kondukmodeloj. Demorgan kaj Molz opinias, ke dum kultura orientiĝo oni limigas la vastan spektron de tiu linio al pli eta regiono. Imagu, ke punktoj de tiu linio troviĝas inter du ekstremoj (la unua egalas al 0 kaj la alia al 10). Kultura orientiĝo metas ĝeneralan konvenan konduton al iu certa punkto, ekz. 3. Ĝi iĝas por ni iusenca elirpunkto por elekto de konduto plej konvena al la konkreta situacio. Tiel en nia ekzemplo la konkretan solvon oni plej verŝajne trovas en regiono inter 2 kaj 4.

Prenu ni kiel ekzemplon komunikadon. Vi origine venas de medio, kie homoj parolas tre implicite (t.e. evitas longajn klarigojn, sed implicite ligas multon al la kunteksto, al tio, kion “ĉiuj scias”). Sekve, konvena, normala komunikado estas sufiĉe implicita. Surbaze de tio vi difinas la zonon de akcepteblaj devioj, t.e. depende de situacio vi povas komuniki iom pli aŭ iom malpli implicite, sed vi neniam komunikos tre eksplicite. Nur spertante situaciojn, en kiuj via konduto montriĝis malsukcesa, vi povas plilarĝigi zonon de konduto akceptebla por vi kaj teorie eĉ eki komuniki eksplicite (kvankam tio eble ĉiam sentiĝos por vi iom nenatura).

Kulturo temas pri elekto de konvena konduto el la linio inter du ekstremaj eblecoj. Kulturo provizas al ni orientigilon, t.e. indikas la modelon, kiu por certa grupo en la pasinteco montriĝis plej sukcesa. Etaj devioj de ĝi estas konsiderataj akcepteblaj, konvenaj, normalaj adaptmanieroj al situacioj. Tro devianta konduto estas konsiderata ĝena, malbona, nenormala.

Kulturoj povas ŝanĝiĝi: se la zono ĉirkaŭ certa orientigo malproporcie etendas sin en unu direkton, se konduto de anoj de iu kulturo havas konstantan tendencon evolui en unu direkton, tiam po iomete ankaŭ orientigo povas ŝoviĝi al la sama direkto.

Laŭ tia koncepto kulturo ne estas ligata al nacio. Ĝi ĉefe temas pri orientiĝo de grupoj da homoj. Komencan orientigon donas ekz. familio, amikoj, lingvo, loĝloko, kolegoj en laborejo ktp. Surbaze de ĉio tio oni povas identigi grupojn de la sama orientiĝo, la sama kulturo. En malsamaj ĉirkaŭaĵoj imagoj pri standarto kaj akcepteblaj devioj de tiu standarto ĉe aparta individuo povas vari. Tiel, ekzemple en laborejo oni povas komuniki pli aŭ malpli eksplicite, dum hejme – pli aŭ malpli implicite. Sed se medioj

de laborejo kaj hejmo similas unu al la alia, tiam standartoj kun akcepteblaj devioj estos tre proksimaj unu al la alia kaj parte eĉ koincidos.

Dum interkultura lernado konfrontante alispecan standarton oni konsciiĝas pri propra kultura orientiĝo. Por povi akcepti ambaŭ orientiĝojn oni devas plilarĝigi spektron de kondukto kaj ŝanĝi siajn kutimojn tiunmaniere, ke ili enkadrigu ambaŭ kulturajn orientiĝojn. Post tio, depende de situacio, oni disponas je pli da elekteblecoj. En principo validas la regulo: ju pli vasta estas la spektro de devioj, des pli da elekteblecoj oni havas por akomodado, por adaptado de propra konduto al kondiĉoj de ekstera mondo. De alia flanko pli vasta zono de deviado gvidas al malsekureco. Pli da elekteblecoj kreas malpli stabilajn situaciojn.

Perantoj en interkulturaj kontaktoj povas esti tiuj, kies spektro de devioj enhavas kulturajn standartojn de ambaŭ flankoj. Tio donas elektojn trovi “komunan kontaktpunkton” inter du malsamaj imagoj pri konvena konduto.

Pro tio, ke ideoj de Demorgon kaj Molz kunigis multajn malsamajn teoriojn kaj modelojn de kulturo, ili trovis multajn adektojn. De alia flanko tiu modelo estas pure teoria kaj apenaŭ uzeblas en praktikaj esploroj. Ĉu eblas eltrovi en kiu grado tiu modelo respegulas realecon? Sed unuavice plej gravas aplikeblo de tiu ĉi teorio por pli bona kompreno kaj interpreto de interkulturaj kontaktoj.

### ***Apliko en junulara laboro***

Ideoj de Demorgon kaj Molz helpas pli profunde kompreni neceson kaj funkcion de kulturo. Krome, tiu teorio ligas koncepton de kulturo ne nur al nacioj, sed al ĉiunivelaj grupoj. En junulara laboro pro la komplika karaktero de la modelo ĝi plej taŭgas por profunda analizo de same komplikaj demandoj.

En praktiko tiu ĉi modelo donas pli profundan imagon pri esenco de interkultura lernado: interkultura lernado temas pri konatiĝo kun si mem kaj pri lernado de novaj kondukto-modeloj, novaj manieroj agi en diversspecaj situacioj. Tiu ĉi modelo ligas tiuspecan lernadon al personaj spertoj de individuo kaj substrekas la defian karakteron de lernado (ja lernado estas firme ligata al la plej baza homa bezono: orientiĝo).

## **2.5. Observado de interkultura lernado**

### **Evolua modelo de interkultura sentiveco de Milton J. Bennet**

Bennet (1993) difinas interkulturan sentivecon surbaze de ŝtupoj de persona evoluo. En la centro de lia evolua modelo staras konstanta akumulado de sperto, kiu okazas dum traktado de kulturaj diferencoj. Kadre de tiu akumulado okazas evoluo de fazo de egocentrismo al fazo je kiu oni konsciiĝas pri kulturaj diferencoj kaj akceptas ilin (tiun fazon Bennett nomas “etnorelativismo”). En la bazo de modelo de Bennett kuŝas “diferencigo”, t.e. la evoluo de kapablo rekoni kaj vivi kun diferencoj. “Diferencigo” estas ligata al du aspektoj: 1) la saman aferon oni povas interpreti malsame, kaj 2) “la diferenco inter kulturoj estas en la maniero subteni modelojn de diferencigo aŭ diversajn imagojn pri la mondo”. La dua aspekto signifas, ke laŭ Bennett kulturoj provizas jam pretajn modelojn por percepto de ekstera mondo. Modeloj de interpreto de realeco, de imago de mondo estas malsamaj en malsamaj

kulturoj. Evolui interkulturan sentivecon tiukaze signifas ellerni kiel rekoni kaj trakti bazajn diferencojn en percepto de mondo en diversaj kulturoj.

### **Fig.5**

#### **Fazoj de etnocentrismo**

Bennett komprenas etnocentrismon kiel vicon de fazoj dum kiuj individuo opinias, ke ĝuste lia/ŝia vizio pri la mondo estas centro de realeco. “Nead” estas la bazo de etnocentrisma mondvizio: la individuo neas ekziston de diferencoj, neas ekziston de aliaj vizioj de realeco. Neado povas okazi pro izoligo: tiukaze oni havas tre malmultajn aŭ eĉ neniujn eblecojn sperti diferencojn kaj sekve ne konscias pri ilia ekzisto. Neado ankaŭ povas baziĝi sur apartigo, t.e. situacio en kiu oni intence apartigas diferencojn, en kiu unuopuloj aŭ grupoj intence metas “barilon” inter si kaj alispecaj homoj por ne devi alfronti diferencojn. Sekve, apartigo enhavas momenton de rekono de diferenco kaj sekve estas iusence pli “evoluita” stato kompare al izoligo. Unu el ekzemploj de apartigo estas rasa segregacio ĝis nun ekzistanta kelkloke en la mondo. Anoj de subpremitaj grupoj kutime apenaŭ spertas fazon de neado, ja estas malfacile nei ekziston de diferenco, se kialo de segregacio estas rifuzo akcepti vian malsamecon aŭ alispecaj vizion de la mondo.

Post “neado” venas fazo de defendo: pro tio ke kulturaj diferencoj proponas alternativon al persona sento de realeco kaj sekve ankaŭ al persona identigo, ili estas konsiderataj minaco. Dum defendado oni perceptas diferencojn kaj sekve provas kontraŭbatali ilin. Tion oni faras per “nigrigo”, t.e. per intence negativa evaluado de alispeca mondvizio. Aliaj defendstrategioj estas uzo de stereotipoj kaj en plej ekstrema kazo eĉ rasismo. La alia flanko de “nigrigo” estas supereco, t.e. substreko de pozitivaj eroj en la propra kulturo. Oni apenaŭ (aŭ preskaŭ ne) atentis pri aliaj kulturoj, kaj sekve implicite taksas ilin malpli bonaj. Foje en tiu ĉi fazo estas uzata ankaŭ tria strategio, kiun Bennett nomas “inversado”. Inversado signifas, ke oni taksas supereca alian kulturon kaj nigrigas propran kulturan fonon. De unua rigardo tiu strategio povas ŝajni pruvo de “interkultura sentiveco”, sed en realeco ĝi nur signifas elekton de alia centro en etnocentrismo (tiun de alia, sed ne de la propra etno).

La plej lastan fazon de etnocentrismo Bennett nomas “minimumigo”: la diferencoj estas agnoskitaj, oni ne plu batalas kontraŭ ili per strategioj de nigrigo kaj supereco, sed provas anstataŭe minimumigu ilian signifon. Oni provas ŝajnigi, ke similecoj inter kulturoj gravas pli, ol diferencoj kaj tiumaniere trivialigas ĉi-lastajn. Laŭ Bennett pluraj organizoj opinias, ke ĝuste minimumigo estas la fina stadio de interkultura evoluo, kaj ekas labori por mondo kie sur komuna bazo regas komunaj valoroj. Tiu komuna bazo venas de biologiaj similecoj inter homoj: ni ĉiuj devas manĝi, digesti la manĝon kaj morti. Konsiderante kulturon daŭrigo de biologia aspekto, oni minimumigas ĝian signifon.

#### **Fazoj de etnorelativismo**

“Etnorelativismo baziĝas sur hipotezo, ke ajna kulturo povas esti komprenata nur en komparo al alia kulturo kaj certa konduto povas esti komprenata nur kadre de kultura kunteksto”. Dum fazoj de etnorelativismo diferenco ĉesas esti minaco kaj iĝas defio.

Anstataŭ ol konservi la jam ekzistantajn kategoriojn de interpretado, oni provas ellabori novajn. Etnorelativismo komenciĝas de akcepto de kulturaj diferencoj. Ĝia unua ŝtupo estas akcepto de la fakto, ke ĉiuj specoj de konduto (ambaŭ per-vortaj kaj sen-vortaj) varias depende de kulturo kaj ke ĉiuj variantoj estas egale respektindaj. Pli poste la akcepto iĝas pli kaj pli larĝa ĝis en ĝian kadron eniras ankaŭ mondvizio kaj valoroj de alia kulturo. La dua ŝtupo subkomprenas konon de siaj propraj valoroj kaj konsciiĝon pri tio, ke ili estas determinitaj de certa kulturo. Oni rigardas al valoroj kiel al proceso kaj al ilo de mondorganizado, ne kiel al ies persona posedaĵo. Eĉ valoroj, kiuj estas motivo por “nigrigo” de iu certa grupo, havas funkcion en organizado de mondo. Tio ne malebligas al iu havi propran opinion pri tiuj valoroj.

La venonta fazo, “adaptado” estas bazita sur akcepto de kulturaj diferencoj. Adaptado staras en kontrasto al asimiliĝo, proceso dum kiu oni akceptas alispecajn valorojn, mondviziojn kaj kondukmodelojn rezignante pri sia propra identeco. Dum adaptado oni lernas novan kondukmodelon konvenan al la alispeca mondvizio kaj aldonas ĝin al sia repertuaro de kondukmodeloj. Aldono de nova konduto signifas uzon de nova stilo de komunikado. Kulturo en tiu interpreto estas proceso: ĝi evoluas kaj moviĝas, sed ne staras statike sur la sama loko. La centro de adaptado estas empatio, t.e. kapablo sperti situacion ne similan al situacioj ekzistantaj en propra kultura fono. Ĝi estas provo kompreni alian homon el perspektivo de ĉi-lastata.

En fazo de pluralismo empatio iĝas pli vasta kaj finfine permesas al individuo uzi kelkajn klarajn referenckadrojn aŭ multifaktorajn kulturajn kadrojn. Evoluo de tiuspecaj kadroj postulas kutime longdaŭran sperton de vivo en alispeca kultura medio. Post tio oni perceptas diferencon kiel naturan parton de sia propra personeco kaj integrigas ĝin en du aŭ pli malsamajn kulturajn kadrojn.

La lastan serion de fazoj Bennett nomas “kunfandado”. Se dum la fazo de adaptado persono posedas kelkajn malsamajn referenckadrojn, dum kunfandado oni faras provon kunigi diversajn kadrojn en unu. Tio nek estas reestablo de unu kulturo, nek komforta kunekzisto de malsamaj mondvizioj. Kunfandado postulas aktualan redifinon de propra identeco surbaze de travivitaj spertoj. Ĝi povas rezultiĝi en tio, ke oni ne plu apartenos al iu certa kulturo sed por ĉiam restos integrita eksterulo.

La unua fazo de kunfandado estas kunteksta evaluado. Ĝi temas pri kapablo evalui diversajn situaciojn kaj mondviziojn surbaze de pli ol unu kultura fono. Dum ĉiuj aliaj fazoj evaluado estis evitata por ke oni povu subpremi etnocentrikan aliron. Je nivelo de kunteksta evaluado depende de cirkonstancoj individuoj kapablas ŝanĝi de unu kultura kunteksto al la alia. La farita evaluo estas bazita sur relativa konveno. Bennett donas ekzemplon de interkultura elekto: “Ĉu oni rekte preparolu la eraron, kiun faris vi aŭ iu alia? En plejparto de usonaj kunteksto, oni tion faru, sed nepre ne faru en plej multaj japanaj kunteksto. Tamen kelkfoje estos konvena uzi la usonan stilon en Japanio, kaj inverse. Kapablo uzi ambaŭ stilojn estas unu el aspektoj de adaptado. Etika konsidero de kunteksto dum elekto de konvena stilo, estas parto de kunfandado”.

La lasta fazo “kreiva marĝeno” estas laŭ Bennett iuspeca alvenpunkto, sed ne la fino

de lernado. Ĝi subkomprenas statojn de plena sinanalizo kaj ne-aparteno al ajna kulturo (pozicio de eksterulo). De alia flanko ĝuste tiu ĉi fazo ebligas veran interkulturan meditado, kapablon uzi diversajn mondviziojn.

Modelo de Bennett montris sin taŭga por planado de trejnadoj kaj kursoj kies celo estas evoluo de interkultura sentiveco. Ĝi substrekas la gravecon de diferencoj en interkultura lernado kaj prezentas kelkajn (neefikajn) strategiojn de traktado de diferencoj. Laŭ Bennett interkultura lernado estas proceso de konstanta antaŭeniĝo (kiu tamen donas eblecon foje fari paŝon malantaŭen) en kiu oni povas mezuri, kiun fazon de interkultura sentiveco atingis aparta individuo.

Oni rajtas demandi, ĉu la proceso de interkultura lernado devas ĉiam sekvi la priskribitan sinsekvon de fazoj en kiu unu fazo estas la antaŭkondiĉo por transiro al la alia. Tamen, se oni fokusas atenton ne sur la sinsekvo de diversaj fazoj, sed sur la diversaj strategioj de traktado de diferencoj, tiu ĉi modelo malkovras bazajn obstaklojn en interkultura lernado kaj indikas manierojn superi ilin.

### ***Apliko en junulara laboro***

Diversaj fazoj, kiujn priskribis Bennett, formas taŭgan referenckadron por observado de grupoj kaj provizas plej konvenajn metodojn kaj enhavon por trejnado pri interkultura sentiveco. Ĉu oni plikonsciiĝu pri diferencoj aŭ ĉu oni anstataŭe strebu akcepti ilin? La ideo de evoluo provizas tre praktikan aliron al punktoj, kiuj postulas apartan prilaboradon. Bennett mem sugestas utilon de sia modelo por trejnado je diversaj niveloj.

Dum internacia junulara renkontiĝo, multaj el procesoj, kiujn priskribis Bennett, okazas tre kompakte. Lia modelo donas al observanto eblecon kompreni diversajn okazaĵojn kaj trakti ilin.

Finfine, la evolua modelo tre klare sugestas la celon de laboro pri interkultura lernado: atingi la staton en kiu oni konsideras diferencojn natura afero, integras ilin en propran identecon kaj ellaboras plurajn kulturajn referenckadrojn.

## **2.6. Resumo**

Post konatiĝo kun diversaj ideoj pri lernado, kulturo kaj interkulturaj spertoj, oni pli klare vidas, ke interkultura lernado estas proceso. Por povi kompreni aliajn, oni devas havi profundan konon de si mem kaj de propra medio. Interkultura lernado estas defia proceso, kiu envolvas profunde enradikiĝintajn ideojn pri kio estas bona kaj kio malbona, pri la strukturo de la mondo kaj de nia vivo. Dum tiu proceso oni ekas pridubi tion, kion individuo opinias normala kaj enda plu havi. Interkultura lernado estas defio al propra identeco – sed samtempe (kiel indikis Bennett) ĝi povas iĝi vivstilo kaj maniero pliriĉigi sian identecon. Bennett donis al sia modelo iom pli politikan perspektivon: interkultura lernado estas individua proceso, kaj sekve temas pri lernado de kunvivado, lernado de vivo en la mondo de diverseco. Vidate tiu maniere, interkultura lernado estas la bazo de paca kunvivado.

## 2.7. Rigardo al interkultura lernado

Malgraŭ tio, ke la ĉefa temo de tiu ĉi T-kito estas interkultura lernado en eksterlerneja medio, lerneja edukado daŭre ludas tre gravan rolon en evoluo de interkulturaj socioj. Pro rekono de tiu fakto estis skribita tiu ĉi ĉapitro.

Sendube, oni povas multon lerni de formala edukado. En pasinteco edukado estis organizita sur egala socia bazo kaj lernejoj akceptis ĉiujn infanojn. Tio antaŭenigis justecon, malpliigante diferencojn kaj celante socian integriĝon. La plej aktuala problemo de moderna socio estas traktado de diferencoj. Kiel (unue en lernejo kaj pli poste en socio) povus ni rekoni kulturajn diferencojn kaj reagnoski ilian valoron kaj samtempe antaŭenigi veran kulturen integriĝon kaj integran evoluon de lernantoj? Interkulturaj principoj postulas malfermecon, aktivan respekton de diferencoj, interkompreniĝon, aktivan toleremon, rekonon de ĉiuj ekzistantaj kulturoj, provizon de egalaj ŝancoj kaj batalon kontraŭ diskriminacio. Komunikado inter personoj de du malsamaj kulturoj povas sentiĝi paradoksa: necesas akcepti ke alia persono samtempe egalas kaj diferencas de vi. En tiu konteksto laŭ Ouellet (1991) ĉefaj celoj de interkultura lernado estas antaŭenigi kaj evolui:

- kapablon pli bone kompreni diversajn kulturojn en moderna socio;
- pli fortan komunikkapablon inter reprezentantoj de diversaj kulturoj;
- flekseblecon en la kunteksto de kultura diverseco en socio;
- pli bonan kapablon partopreni en sociaj interagoj kaj rekonon de komuna heredaĵo de homaro.

La ĉefa celo de interkultura edukado estas antaŭenigi kaj evolui kapablojn de lernantoj interagi kaj komuniki kun la ĉirkaŭa mondo. Laŭ Guerra (1993) por atingi plej bonajn rezultojn de tiuspeca edukado ni devas certigi, ke:

- ĉiuj lernantoj (sendepende de tio, ĉu ili apartenas al minoritataj grupoj aŭ al majoritataj) lernu pri pluralismo;
- minoritatoj ne devu rezigni pri propraj kulturaj referencoj;
- ĉiujn kulturojn oni taksu egalaj;
- oni provizu subtenajn mekanismojn por garantii saman probablecon de sukceso al ĉiuj infanoj (ambaŭ de minoritataj kaj majoritataj grupoj).

Tamen, evoluante aspektojn de interkultura edukado, ni riskas agi subjektive (eĉ ne ĉiam konsciante pri tio). Por averti instruistojn pri eblaj riskoj, Ladmiral kaj Lipiansky (1989) indikas du “kaptilojn” kiujn devas eviti instruisto:

- 1) redukti la kulturen realecon de lernantoj al rapidaj ĝeneraligoj;
- 2) interpreti ĉiujn konfliktojn nur el la kultura vidpunkto, forgesante pri psikologiaj kaj sociaj faktoroj, kiuj povas kaŭzi certan konduton;

Abdallah-Preteceille aldonas la trian “kaptilon”: provi solvi ĉiujn malfacilaĵojn nur surbaze de racie akiritaj konoj.

Instruistoj devas memori, ke edukado estas tre postulema proceso. Ĝi estas postulema ne nur el la perspektivo de aparta lernanto, sed ankaŭ rilate al la ĉirkaŭa medio kaj eĉ personeco de instruisto. Instruistoj devas analizi siajn proprajn kulturajn identecojn

kaj personecojn kaj de tie ĉerpi inspiron por sia pedagogia praktiko. Hoopes (citita de Ouellet – 1991) konsilas al instruistoj evolui kapablojn analizi proprajn modelojn de percepto kaj stilojn de komunikado, kaj plibonigi scipovon aŭskulti. (Mi kredas, ke se oni uzos “aktivan” aŭskultadon, oni atingos eĉ pli efikan rezulton). Estas esence grava ke instruisto konsciui pri propra kulturo kaj komprenu mekanismojn de siaj antaŭjuĝoj, kredoj, moralaj principoj kaj valoroj.

Interkultura edukado metas en la centron de rilatoj alian homon. Ĝi kuraĝigas konstantan pridemandadon de hipotezoj, de aferoj memkompreneblaj por ni kaj kuraĝigas konstantan malfermiĝon al la sfero de ne jam konata kaj komprenita. Dum interagado kaj reciproka esplorado ĉiu povas perfektigi sin: persone, socie kaj universale. La proceso de edukado celas kuraĝigi lernantojn preni respondecojn kaj helpas al ili iĝi plenrajtaj membroj de socio. Ne sufiĉas nur surpapere skizi vizion de lerneja laboro por antaŭenigo de interkultura lernado en certa nacio aŭ regiono. La aktuala bezono estas, ke tiun vizion oni konkretigu, antaŭenigu kaj evoluu per novaj iniciatoj en trejnado de instruistoj kun la fina celo ŝanĝi pensmanieron de tuta loĝantaro. Necesas urĝe trovi solvojn por tio. Alikaze venontaj generacioj riskas ne plu havi bone preparitajn edukantojn. “Eduki signifas helpi lerni esti” memorigas la politikisto Edgar Faure (1908-1988). Kaj kiujn referenckadrojn havas ni, instruistoj, kiuj mem konstante estas en proceso de akirado de propra personeco? Ni bezonas pli da priesploroj faritaj de instruistoj mem. Iom troige dirite, nia nuno kaj nia estonto estas en la manoj de instruistoj kaj ni urĝe devas okazigi bezonatajn ŝanĝojn.

La duobla funkcio de lernejo: eduki kaj trejni, devas certigi maksimuman evoluon de ĉiu lernanto, certigi, ke ĉiuj kulturoj estis transdonitaj en la komuna etoso de reciproka malfermeco. Kelkaj reformoj de eduksistmo rekomendas aplikon de induktiva instrumentado kies centro estas interesoj de lernanto. Ni devas aparte atenti pri tio kiel oni povas utiligi rektan sperton por pliigi respekton al diferencoj kaj plifortigi kulturan sentivecon. Instruisto, kiel peranto de ŝanĝoj, devas provizi lernigajn spertojn kaj bonajn eblecojn antaŭenigi kaj akcepti ĉiujn kulturojn en la spirito de demokratio.

Konklude, interkultura edukado devas esti celo de ĉiuj lernejoj en la moderna socio. Sen tio ni riskas krei mizeran uniformecon bazitan sur segregacio kaj elitismo. Se niaj penoj pri edukado montros al homoj kulturajn diferencojn kaj similecojn, montros rajton de ajna kulturo al sinevoluo, ni finfine atingos pli aktivan engaĝiĝon kaj partoprenon en la socia vivo. Tiam ni estos envolvitaj en eduksistemon kiu batalas kontraŭ disdividado kaj laboras por kreo de nova pensmaniero kaj nova socio malferma al interhoma respekto. Se ni volas, ke ĉiu homo sentu sin plenalora, ni devas zorgi pri ĉiuspeca disvastigo de interkultura lernado en lernejoj kaj la socio. Kaj tiam, kiu scias – eble iam ni eĉ atestos transkulturan edukadon!

### **2.7. Rigardo al interkultura lernado**

Malgraŭ tio, ke la ĉefa temo de tiu ĉi T-kito estas interkultura lernado en eksterlerneja medio, lerneja eduko daŭre ludas tre gravan rolon en evoluo de interkulturaj socioj. Pro rekono de tiu fakto estis skribita tiu ĉi ĉapitro.

Sendube, oni povas multon lerni de formala edukado. En pasinteco edukado estis organizita sur egala socia bazo kaj lernejoj akceptis ĉiujn infanojn. Tio antaŭenigis justecon, malpliigante diferencojn kaj celante socian integriĝon. La plej aktuala problemo de moderna socio estas traktado de diferencoj. Kiel (unue en lernejo kaj pli poste en socio) povus ni rekoni kulturajn diferencojn kaj reagnoski ilian valoron kaj samtempe antaŭenigi veran kulturen integriĝon kaj integran evoluon de lernantoj? Interkulturaj principoj postulas malfermecon, aktivan respekton de diferencoj, interkompreniĝon, aktivan toleremon, rekonon de ĉiuj ekzistantaj kulturoj, provizon de egalaj ŝancoj kaj batalon kontraŭ diskriminacio. Komunikado inter personoj de du malsamaj kulturoj povas sentiĝi paradoksa: necesas akcepti ke alia persono samtempe egalas kaj diferencas de vi. En tiu konteksto laŭ Ouellet (1991) ĉefaj celoj de interkultura lernado estas antaŭenigi kaj evolui:

- kapablon pli bone kompreni diversajn kulturojn en moderna socio;
- pli fortan komunikkapablon inter reprezentantoj de diversaj kulturoj;
- flekseblecon en la kunteksto de kultura diverseco en socio;
- pli bonan kapablon partopreni en sociaj interagoj kaj rekonon de komuna heredaĵo de homaro.

La ĉefa celo de interkultura edukado estas antaŭenigi kaj evolui kapablojn de lernantoj interagi kaj komuniki kun la ĉirkaŭa mondo. Laŭ Guerra (1993) por atingi plej bonajn rezultojn de tiuspeca edukado ni devas certigi, ke:

- ĉiuj lernantoj (sendepende de tio, ĉu ili apartenas al minoritataj grupoj aŭ al majoritataj) lernu pri pluralismo;
- minoritatoj ne devu rezigni pri propraj kulturaj referencoj;
- ĉiujn kulturojn oni taksu egalaj;
- oni provizu subtenajn mekanismojn por garantii saman probablecon de sukceso al ĉiuj infanoj (ambaŭ de minoritataj kaj majoritataj grupoj).

Tamen, evoluante aspektojn de interkultura edukado, ni riskas agi subjektive (eĉ ne ĉiam konsciante pri tio). Por averti instruistojn pri eblaj riskoj, Admiral kaj

Lipiansky (1989) indikas du “kaptilojn” kiujn devas eviti instruisto:

- 3) redukti la kulturen realecon de lernantoj al rapidaj ĝeneraligoj;
- 4) interpreti ĉiujn konfliktojn nur el la kultura vidpunkto, forgesante pri psikologiaj kaj sociaj faktoroj, kiuj povas kaŭzi certan konduton;

Abdallah-Preteceille aldonas la trian “kaptilon”: provi solvi ĉiujn malfacilaĵojn nur surbaze de racie akiritaj konoj.

Instruistoj devas memori, ke edukado estas tre postulema proceso. Ĝi estas postulema ne nur el la perspektivo de aparta lernanto, sed ankaŭ rilate al la ĉirkaŭa medio kaj eĉ personeco de instruisto. Instruistoj devas analizi siajn proprajn kulturajn identecojn kaj personecojn kaj de tie ĉerpi inspiron por sia pedagogia praktiko. Hoopes (citita de Ouellet – 1991) konsilas al instruistoj evolui kapablojn analizi proprajn modelojn de percepto kaj stilojn de komunikado, kaj plibonigi scipovon aŭskulti. (Mi kredas, ke se oni uzos “aktivan” aŭskultadon, oni atingos eĉ pli efikan rezulton). Estas esence grava ke instruisto konsci pri propra kulturo kaj komprenu mekanismojn de siaj

---

antaŭjuĝoj, kredoj, moralaj principoj kaj valoroj.

Interkultura edukado metas en la centron de rilatoj alian homon. Ĝi kuraĝigas konstantan pridemandadon de hipotezoj, de aferoj memkompreneblaj por ni kaj kuraĝigas konstantan malfermiĝon al la sfero de ne jam konata kaj komprenita. Dum interagado kaj reciproka esplorado ĉiu povas perfektigi sin: persone, socie kaj universale. La proceso de edukado celas kuraĝigi lernantojn preni respondecojn kaj helpas al ili iĝi plenrajtaj membroj de socio. Ne sufiĉas nur surpapere skizi vizio de lerneja laboro por antaŭenigo de interkultura lernado en certa nacio aŭ regiono. La aktuala bezono estas, ke tiun vizion oni konkretigu, antaŭenigu kaj evoluu per novaj iniciatoj en trejnado de instruistoj kun la fina celo ŝanĝi pensmanieron de tuta loĝantaro. Necesas urĝe trovi solvojn por tio. Alikaze venontaj generacioj riskas ne plu havi bone preparitajn edukantojn. “Eduki signifas helpi lerni esti” memorigas la politikisto Edgar Faure (1908-1988). Kaj kiujn referenckadrojn havas ni, instruistoj, kiuj mem konstante estas en proceso de akirado de propra personeco? Ni bezonas pli da priesploroj faritaj de instruistoj mem. Iom troige dirite, nia nuno kaj nia estonto estas en la mano de instruistoj kaj ni urĝe devas okazigi bezonatajn ŝanĝojn.

La duobla funkcio de lernejo: eduki kaj trejni, devas certigi maksimuman evoluon de ĉiu lernanto, certigi, ke ĉiuj kulturoj estis transdonitaj en la komuna etoso de reciproka malfermeo. Kelkaj reformoj de eduksistmo rekomendas aplikon de induktiva instrumetodo kies centro estas intereso de lernanto. Ni devas aparte atenti pri tio kiel oni povas utiligi rektan sperton por pliigi respekton al diferencoj kaj plifortigi kulturan sentivecon. Instruisto, kiel peranto de ŝanĝoj, devas provizi lernigajn spertojn kaj bonajn eblecojn antaŭenigi kaj akcepti ĉiujn kulturojn en la spirito de demokratio.

Konklude, interkultura edukado devas esti celo de ĉiuj lernejoj en la moderna socio. Sen tio ni riskas krei mizeran uniformecon bazitan sur segregacio kaj elitismo. Se niaj penoj pri edukado montros al homoj kulturajn diferencojn kaj similecojn, montros rajton de ajna kulturo al sinevoluo, ni finfine atingos pli aktivan engaĝiĝon kaj partoprenon en la socia vivo. Tiam ni estos envolvitaj en eduksistemon kiu batalas kontraŭ disdividado kaj laboras por kreo de nova pensmaniero kaj nova socio malferma al interhoma respekto. Se ni volas, ke ĉiu homo sentu sin plenvalora, ni devas zorgi pri ĉiuspeca disvastigo de interkultura lernado en lernejoj kaj la socio. Kaj tiam, kiu scias – eble iam ni eĉ atestos transkulturan edukadon!